# TEJO-aktuale: numero 302, 2012-07-28

## Ne mankas kialoj por membriĝi en TEJO!

Rigardu la filmon: http://tejo.org/eo/node/1430

Restis lastaj tagoj de la promocio, kiam tutnovaj aliĝantoj povas ricevi TEJO-T-ĉemizon bonvenige-donace.

## INFORMITALE: Somera kongreso sur la marbordo mediteranea

Mazaradelvalo - la urbo de Esperanto meze de Mediteranea maro!

De la 18a ĝis la 25a de aŭgusto la 79a Kongreso de Esperanto en Italujo okazos en Mazaradelvalo, Sicilujo.

Ĝi estas la urbo kies urbestro volas ke ĝi fariĝu centro de Esperanto, li jam venis al nacia kongreso por inviti nin kaj helpis por malfermi kursojn en ĉiuj lernejoj de sia urbo - tie jam pli ol 500 junuloj lernas nun Esperanton.

La urbo estas tre facile atingebla kaj de la flughaveno de Trapani (TPS) kaj de tiu de Palermo (PMO).

Aliĝu nun per nia reta paĝaro: http://kongreso.esperanto.it

Se vi organizas karavanon, kontaktu nin: ni publikigos viajn informojn en niaj paĝoj.
Nia adreso estas: kongreso ĉe esperanto.it

## II-a INTERNACIA FESTIVALO DE E-KANTO, RECITADO, ORATORA KONKURSO, 31.03-02.04.2012, KARLOVO-SOPOT, BULGARIO

KATEGORIOJ por la festivala konkurso-La premioj por partopreno la konkursan programon estos distribuotaj surbaze de la aĝo

-I -a grupo- infanoj ĝis 12 jaraĝaj -

-II- a grupo- gelernatoj ĝis 18 jaraĝaj

-III-a grupo gestudentoj kaj gejunuloj ĝis 35 jaraĝaj

-IV-a grupo aĝuloj pli ol 36 jaraĝaj

En ĉiu grupo aparte estos distribuo de la premioj por individua kaj grupa partopreno /koruso/

TRANOKTADO: en komuna loĝejo- po 7 euroj por unu tranokto en hoteloj 25-50 euroj por unu tranokto

ALIĜKOTIZO 5 eŭroj por la partoprenontoj festivalan programon /por gelernantoj kaj gestudentoj la aliĝkotizo estas 2 euroj/ 10 euroj por gastoj

POSTFESTIVALA FERIADO ‘KARLOVA PRINTEMPO”/3-10.04.2012/

Ripozado kaj ekskursoj al diversaj proksimaj de Karlovo urboj/Plovdiv Kalofer. Kazanlak Baĉkova monakejo,Trojan k.a/Sen aparta aliĝkotizo .Tranoktado en komuna loĝejo kaj hoteloj / Rimarko: partoprenontoj la Festivalon kaj la Feriadon kiuj tranoktos en la komuna loĝejo uzos rabaton pagonte 50 eŭrojn por la tuta tranoktado- 10 tranoktoj/

LIMDATO POR RICEVO DE ALIĜILOJ- 26.03.2011 /La aliĝkotizoj, kotizoj por la tranoktoj, vespermanĝoj estas pageblaj al bankokonto aŭ surloke, sed la aliĝiloj devus esti siatempe senditaj por rezervi la tranoktojn/

ADRESO POR ALIĜO KAJ INFORMOJ: Bulgario 4300 Karlovo p.k.44 ESPERINFORM

Retadreso: leonov ĉe rozabg.com /preferinde skribu rete /

Telefonoj: +359 885056469 /tage kaj nokte/ +359 335 9 3933/nur vespere/

## Studsesio komenciĝas en Poznan

La dua studsesio de interlingvistikaj studoj ĉe la Universitato Adam Mickievicz komenciĝas en Poznan, Pollando. La nova grupo venis en septembro 2011 unuan fojon en Poznan por plena surloka studsesio. Ekde la 28a de januaro 2012 komenciĝas la dua studsesio kaj la unua ekzamensesio kun tri ekzamenfakoj: fonetiko, kulturo kaj literaturo. Studas 19 personoj el diversaj eŭropaj landoj, el Usono kaj Brazilo.

## Ecotopia 2012 kaj Klimat- kaj Energi-tendaro en Lausitz, Germanio

La 1-an ĝis 26-an de aŭgusto okazos Ecotopia 2012 kaj 12-an ĝis 19-an de aŭgusto okazos Klimat- kaj Energi-tendaro en Lausitz, Germanio
Verdula(j) tendaro(j) en la orientgermana vilaĝo Jänschwalde , inter Cottbus kaj Guben. Antaŭvideble, partoprenado en la tendaroj estos sufiĉe malmultekosta, kaj la etoso estas ege agrabla. La manĝaĵo kuirata estas vegetara/veg(etal)ana, sed tio ne ĝenas, ĉu? Pliaj informoj: http://www.ecotopia2010.org aŭ kontaktu Ronaldo N. ro-esp ĉe dds.nl

## [Esperanto] La albumo REVADO ĉe Ĉina Radio Internacia

Lundon la 30an de Januaro 2012 Ĉina Radio Internacia intervjuis la italan muzikan grupon Rêverie, pri ĝia nova duobla albumo “Revado”.

La elsendo estas aŭskultebla ĉe tiu ĉi ligilo: http://esperanto.cri.cn/641/2012/02/03/1s13258 ...

REVADO estas aĉetebla per la retejoj de Vinilkosmo : En la diskoservo: http://www.vinilkosmo.com/?disc=vkkd107&ln ...

En la elŝutservo (MP3-OGG): http://www.vinilkosmo-mp3.com/revado-c-76_177_ ...

Laŭ FLAC formato ĉe: http://cd1d.com/fr/album/revado

Vizitu ankaŭ la oficialan retejon de la bando http://www.reverieweb.com kaj por pliaj informoj pri la bando vidu la esperanto-blogaĵon http://www.tinyurl.com/reverie-andrea

## [Esperantistoj] Venu somere al Bajkalo, kie okazos "Renkontiĝo de Amikoj“

La lastan fojon ĝi okazos en tiu unika loko!!! Riĉa programo, bonega naturo kaj gajaj esperantistoj! Pli da informo vi trovos ĉi tie http://ra.nsk.ru/RA-7/

## [baveleto] Trilanda renkontiĝo en Tongeren, Belgio, la 22an de aprilo 2012

Senlime kaj la Esperantista Grupo Verviers-a invitas vin al Trilanda Renkontiĝo en (BE-)TONGEREN, dimanĉon, la 22an de aprilo 2011 (10h00-17h30).

Vidu la video-reklamon (10 min.) ĉe http://www.youtube.com/watch?v=J6Go_ELBrZE

Aliĝkotizo (ĉio enkalkulita krom tagmezaj trinkaĵoj): 30 EUR.

Ni atentigas vin pri la fakto ke vizitoj de la muzeo en esperanto NE eblas, sed la tri lingvoj (FR-DE-NL) estas ene uzataj. Programŝanĝo eble okazos laŭ la fina nombro da aliĝintoj.

Bonvolu antaŭpagi la sumon de 30 EUR (partopreno + manĝo), NUR al la konto 979-5327148-10 de Senlime, IBAN : BE41 9795 3271 4810 BIC : ARSPBE22 (banque : Argenta).
Klare menciu la celon de via pago, kiu nepre ESTU SUR NIA KONTO plej malfrue la 15-an de aprilo : ĝi ebligas vian partoprenon (aliĝilo ne necesas – eventuala repago pro kiu ajn kialo principe neeblas).

Bonvenon en Tongeren-o !

Pliaj informoj:

ttt-ejo: http://www.tongeren.be/Toerisme (elektu vian lingvon)

retadreso: jacques ĉe senlime.org

**[Amikoj de la Kopenhaga Esperantisto-klubo] Informo pri du kunvenoj ricevita de la Esperanto Kulturgrupo en Kopenhago:**

*Malsukcesa elŝuto.*

## Venontaj renkontiĝoj

70a Regiona Staĝo de Esperanto, 23 / 24 / 25-an de marto 2012, LA PETITE PIERRE, Francio
http://esperanto.alsacelorraine.perso.neuf.fr

28a Printempa Semajno Internacia (PSI), 2a ĝis 9a de aprilo en Bonn, Germanio http://esperanto.de/psi

IJF - Internacia Junulara Festivalo 2012, 4a de aprilo ĝis 10a de aprilo 2012, Cattolica, Italio
http://iej.esperanto.it/ijf/2012

MK - Mezorienta Kunveno, Gaziantep, Turkio, 6a ĝis 8a de aprilo
http://uea.org/vikio/La_kvina_Mezorienta_Kunveno_en_Turkujo_en_2012

PRINTEMPE 2012, 5-a ĝis 12-a de aprilo 2012, Marienburg apud Zell/Mosel, Germanio
http://www.esperantoland.org/printempe

KEKSO-RENKONTIĜO, 6.4. ĜIS 9.4.2012 EN Rostock, GERMANIO http://www.esperanto.de/kekso (germane)

La franca Kulturdomo de Gresillon organizas sian duan PRINTEMPAN SEMAJNON de la 13a ĝis 21a de aprilo 2012
http://gresillon.org/printempo

Edinburga Kunkongreso de Esperanto, 20a ĝis 22a de Aprilo 2012, Skotlando http://britakongreso.org/eo/

Krokodila Renkontiĝo, 27-a de aprilo ĝis la 1-a de majo 2012, Arrout, suda Francio / Okcitanio
http://krokodila2012.wordpress.com/ aŭ krokodila2012 ĉe gmail.com

6a Translima Renkontiĝo Esperantista de la Esperanto-Grupo Essen (TRE-EGE), 5an de majo 2012 en Essen, Germanio Ludger Schmeink ludger.schmeink ĉe esperanto.de

Internacia Fervojista Esperanto-Kongreso 19.05.2012 - 25.05.2012 en Herzberg am Harz - la Esperanto-urbo
http://ifk64.esperanto-urbo.de

Landa kongreso de Esperanto en Saint-Aignan de Grand Lieu (apud Nantes, Francio), 25a ĝis la 29a de majo
http://esperanto-france.org/congres-national-esperanto-2012

3a JRN en Brazilo, 7a ĝis la 10a de junio 2012, Pocinhos, Brazilo http://jrn-eo.blogspot.com

TEATRO-STAĜO de la 7-a ĝis la 17-a de julio 2012 en Minsko, Belarusio http://www.morgaulaprintempo.eu

10a Kultura Esperanto Festivalo, Danio, Hillerød (norde de Kopenhago), la 10a ĝis la 16a de julio
http://kef10.saluton.dk/

OSIEK-konferenco kun riĉa turisma programo, 14-a ĝis la 20-a de julio, okazos en Svitavy, Ĉeĥio Petro Chrdle,
chrdle ĉe kava-pech.cz

9-a kongreso de EEU 2012, 16a ĝis 20a de julio 2012, Galivo, Irlando http://eeu-kongreso.webnode.com/

Hanoja UK de la 28-a de julio ĝis la 4-a de aŭgusto 2012 http://uea.org/dokumentoj/komunikoj/gk.php?no=413#2

2012-07-28/08-04 Greziljono: Alternativa Semajno kun verd-politika seminario de AVE http://gresillon.org/s2

IJK 2012, 5a ĝis 12a de aŭgusto 2012 en Hanojo, Vjetnamio http://www.tejo.org/ijk

TRE SENPAGA instruista trejnado en Sicilio (Italujo) de la 16a ĝis la 25a de aŭgusto 2012
http://edukado.net/novajhoj?id=205

79a Kongreso de Esperanto 18a ĝis 25a de aŭgusto 2012, Mazaradelvalo, Sicilujo, Italujo
http://kongreso.esperanto.it/

[baveleto] 2a Esperantista Migrado Aŭtuna (EMA), 30a de septembro - 5a de oktobro 2012
http://www.esperanto.de/gea/ema2012.html

Pliaj renkontiĝoj haveblas en la Internacia Kalendaro: http://www.eventoj.hu